

Usona Esperantisto № 2022:6 (nov-dec)

Anoncoj

EUSA serĉas lokojn por venontaj kongresoj; Helpu georfojn per ANF; NASK spring readiness course; NASK studrondo pri tradukado; EUSA nun en Mastodon; ESF matches donations to EUSA; Nova traduko havebla ĉe FEL

La vivo de Peĉjo

ŝercoj • Timothy BORONCZYK

La dudek-kvara en serio de Timothy BORONCZYK.

De la estraro

Dumonataj raportoj de la Direktoroj kaj aliaj estraranoj.

Paco

senintenca esperantaĵo • Ellen EDDY

“Domaĝe ke oni ne povas aĉeti ilin por malpacemaj homoj.”

Pri edukado en Esperanto-USA

de la prezidanto • Filipo DORCAS

Nova komisiito pri edukado.

Bimonthly expense report

de la centra oficejo • Vilĉjo HARRIS

Expense report from the CO for October and November.

Using “ol” with the accusative

language corner • Lee MILLER

In the sentence “Oni ne povas vidi ion pli malgrandan ol sablero”, why doesn’t “sablero” need the accusative ending -n?

Esperanto sur mondpokala pilko

media hits

Adidas kaj FIFA aldonis al ĝi mesaĝon en la internacia lingvo.


Zamenhof kaj Ben-Jehuda

historie • Joshua HOLZER

Ĉiu estis la dua egoo de la alia.

Mikronoveloj

Novaj centvortaĵoj.



Anoncoj

EUSA serĉas grupojn por gastigi kongresojn

Kiel vi eble jam scias, la Landa Kongreso de Esperanto-USA en 2023 okazos en Raleigh, NC.

Kie ĝi okazos en la sekvaj jaroj, 2024 kaj 2025?

La estraro de Esperanto-USA nun akceptas proponojn de lokaj grupoj, kiuj volas gastigi la kongreson en sia urbo. Bonvolu konsideri en via loka grupo ĉu la Landa Kongreso de Esperanto-USA okazu ĉe vi. Bonvolu kontakti vian regionan kunordiganton.

— *Filipo DORCAS*

Uzu vian Esperanton – helpu georfojn



Ĉu vi aŭ via loka grupo serĉas indan projekton? Jen kandidato kun bona celo kaj urĝa bezono.

Mi estas Will NORTON, estrarano kaj subtenanto de organizaĵo nomata Asocio Nova Familio (ANF) en la urbo Goma en la Demokratia Respubliko Kongo. ANF helpas al kelkaj el la infanoj de Goma orfigitaj de la multaj militoj en la regiono.

Mi subtenas ANF-on ĉar la infanoj lernas Esperanton kaj la gvidantoj estas esperantistoj. La asocio strebas konkrete realigi la bonajn idealojn de la Esperanta movado. Mi petas, ke ankaŭ vi helpu, same kiel kelkaj membroj de Esperanto-USA subtenas la georfojn, inkluzive de Anna kaj Larry BENNETT, Fred MEYER, Chuck MAYS, Marcia REGO, kaj Leland ROSS.

Eble vi ankoraŭ ne aŭdis pri ANF, do mia celo per tiu ĉi artikolo estas informi la esperantistojn en Usono pri tiu bonfara organizaĵo.

Por pli informiĝi, bonvolu viziti la **jutuban kanalon (YouTube) de ANF** <<https://youtube.com/channel/UC8az11YwBzIglhQMz5Y5Qgg>>. Se vi estas membro ankaŭ de UEA, vi povas trovi informon pri ANF en la numero de la **revuo Esperanto**

<<https://revuoesperanto.org/>> de Aprilo 2020.

Elŝutu la numeron kaj serĉu la artikolon “Letero de Goma” de Augustin KAKOZWA.

Kiel vi povas helpi?

1. ANF bezonas grupon en Usono kiu informos pri ANF kaj petos donacojn. Peti monon de kiu? Certe de esperantistoj ĉar nia lingvo ligas nin al la georfoj. Kaj eble ankaŭ neesperantistaj bonkoruloj en via komunumo, preĝejo, aŭ organizoj, kiuj, sciante pri la bezonoj de la infanoj, decidus subteni ilin finance.
2. Per viaj personaj donacoj sendataj al Haruo Ross per PayPal ĉe rosharuo@gmail.com.
3. ANF havas programon de “geonkloj” kiuj subtenas individuajn infanojn, se vi preferas rekte subteni unu infanon. Skribu al Augustin KAKOZWA ĉe augukako@gmail.com por detaloj.
4. Invitu reprezentanton de ANF al via reta kunveno por prezenti pri ANF.

ANF subtenas 200 georfojn. Dum unu jaro ANF bezonas po USD 300 por ĉiu georfo, aŭ USD 60,000 entute. Mi scias, ke usonaj esperantistoj ne povas provizi tiom da mono. Bonŝance, ANF ricevas subtenon ankaŭ de esperantistoj en Eŭropo kaj aliaj landoj. Mi prezentas la tuton nur por ke vi komprenu la defion, kiun ANF alfrontas kaj la nivelo de nia bezono.

Nepre invitu nin prelegi dum via reta kunveno, skribu al mi kun viaj demandoj, kaj sendu donacojn kiam vi povas.


Koran dankon.

Nome de la estraro de ANF (Augustin KAKOZWA, Raymond WASANGA, Jacqueline YOHALI – Respubliko Demokratia Kongo; Frédéric DUE, Petra DUECKERSHOFF, Betti MAUL – Germanujo; Pastro Guzavo ZANOLI – Italujo; Will NORTON – Usono).

— Will NORTON <willdnorton@gmail.com> & Augustin KAKOZWA <augukako@gmail.com>

NASK “readiness” course

NASK is offering online courses again for Spring 2023, and the first is a “readiness course” running from April 4th to May 4th, taught by the affable and talented Rafa NOGUERAS. The course description:



Great preparation for the summer NASK courses and congresses. The course limit is 20, so sign up early!

Have you learned some Esperanto, but want to make sure you have a good grasp of the basics of grammar? Did you learn Esperanto some time ago, and want a refresher course? Rafa will take you through the core concepts of the language and will make sure you have a firm footing.

The course fee is USD 90, and stipends are available upon request.

(Please note that this is a repetition of the Spring 2022 course.)

For more information, see the **course description at the NASK website** <http://nask.esperanto-usa.org/sesioj/2023-pretiga_kurso/>.

Printempa NASK-kurso pri tradukado

Por la dua printempa NASK-kurso, Hoss FIROOZNA gvidos 12-semajnan, retan studrondon (de Marto ĝis Junio) pri la arto de tradukado – temo kiu eble interese legantojn de la rubriko *Traduku!* Jen

eltiraĵo el la priskribo:

Literaturo estas inter la plej altaj esprimoj de homaj spertoj, kaj interkultura perado de homaj spertoj estas la ekzistokialo de Esperanto.

Do literatura tradukado havas aparte gravan rolon en nia lingvo, sed ne nur tial; Esperanto efektive naskiĝis el literatura tradukado, kaj per tradukoj ĝi daŭre riĉiĝas kaj maturiĝas.

Neniu unuopa kurso povas sufiĉi por instrui la tradukarton, tamen ni povas multon lerni studante la konsilojn de niaj antaŭuloj. En ĉiu semajno ni zorge legos kaj diskutos eseon aŭ komenton de iu tradukisto fama (aŭ fifama, depende de la vidpunkto), donante apartan atenton al aplikiĝo de ties konsiloj al la defioj de tradukado al (kaj el) Esperanto.

Partoprenantoj **ne** devas esti spertaj pri tradukado; necesas ĉefe intereso pri la temo. La kotizo estos USD 90, kaj rabatoj haveblas.

Por pli da informo, vidu la **priskribon de la kurso ĉe la NASK-retejo** <<http://nask.esperanto-usa.org/sesioj/2023-tradukokurso/>>.

E-USA en Mastodon

Pro diversaj kialoj, multaj uzintoj de Twitter lastatempe fuĝis de la socia komunikilo, serĉante alternativojn.



Pluraj migris al **Mastodon**

<<https://eo.wikipedia.org/wiki/Mastodon>>, servo kiu havas similan funkcion, sed malsaman strukturon. Malkiel komercaj entreprenoj kiel Twitter aŭ Facebook, Mastodon konsistas el vasta reto de sendependaj, private administritaj serviloj, interkomunikiĝante per malfermitkoda protokolo. Ĉar neniu povas posedi la tutan reton, ĝi ne tiel dependas de la kapricoj de unuopa firmao aŭ homo.

Por servi al la kreskanta uzantaro de Mastodon,

E-USA nun havas konton tie. Per ĝi ni aperigas la tutsamajn afiŝojn, kiujn ni jam afiŝas en Twitter, Facebook, kaj Reddit.

Se vi estas uzanto de Mastodon, sekvu nin ĉe
@esperantousa@esperanto.masto.host

<<https://esperanto.masto.host/@esperantousa>>.

ESF matches donations to E-USA

E-USA is delighted to announce that the Esperantic Studies Foundation (ESF) has agreed to extend its matching program for donations to E-USA through 2023, up to a total of \$5000 for the year.



When you donate to E-USA through ESF, your donation will be matched dollar for dollar. The matching funds are intended to be used to provide direct benefit to E-USA members and in the past have been crucial to the success of the Usona Bona Film-Festivalo and to production of the film version of the new play *1910* that was performed onstage at the UK in Montreal in August 2022. Please donate to help us continue to fund Esperanto activities and programs in the United States.

Donate today! <<https://www.paypal.com/donate>>

/?hosted_button_id=7PDRAZGYEG9E>

Nova traduko ĉe FEL

Ni ĝojas anonci, ke Flandra Esperanto-Ligo ĵus eldonis libron tradukitan de nia leganto kaj foja kontribuanto Bruce ARTHUR el Saskaĉevano.

La Milita Vojo de Granda Urso

<<http://retbutiko.be>

/en/ero/mivo> estas historio de la rilato de Granda Urso kaj aliaj kirisaj indianaj ĉefoj kaj iliaj sekvantoj, al la Kanada Nord-Okcidenta Ribelo de 1885, la masakro ĉe Frog Lake, la okazoj, kiuj kondukis al ĝi kaj kiuj sekvis, kaj de du monatoj de mallibereco en la tendaro de la agresantoj.

La libro temas ne nur pri militado, sed pri la kulturo de la indianoj je tiu grava turnopunkto de ilia historio. Ankaŭ Usono ofte menciigas, kaj pluraj homoj en la libro estis usonanoj aŭ loĝis en Usono.

La Milita Vojo de Granda Urso <<http://retbutiko.be> /en/ero/mivo>, de William Bleasdel CAMERON. Tradukis Bruce ARTHUR en kunlaboro kun Sylvain AUCLAIR, Don REBLE, Bruce CRISP, kaj Vaughn SEWARD. 178 paĝoj. €6.50. Havebla en PDF- kaj ePUB-formoj.

La Milita Vojo de Granda Urso



La vivo de Peĉjo

ŝercoj • Timothy BORONCZYK

Teksto kaj ideo de Timoteo; desegnaĵoj de "Awesome Satyr". (Kaŝnomo, kompreneble. Timoteo klarigas, ke la artisto preferas resti anonima.)



De la estraro

Usonanoj ekzameniĝas kaj sukcesas!

Ruth KEVSS-COHN ("Margo" en Esperantujo) estas unu el la Direktoroj de Esperanto-USA kaj membro de la KER-komisiono de la Akademio de Esperanto. Kontakti ŝin ĉe ruth3209@gmail.com.

Dek kvin kuraĝaj usonaj esperantistoj sukcese trapasis KER-ekzamenon en 2022. Tiuj oficialaj ekzamenoj estas profesie kreitaj de lerta teamo de edukistoj sub la gvidado de Katalin KOVÁTS, internacie konata instruisto de Esperanto. La KER-ekzamenojn oni okazigis en 2022 kaj ĉeeste kaj rete. Unuafoje haveblas KER-ekzameno je la plej alta C2-nivelo.



Gratulojn al la sukcesintoj:

- **B1K** (parola kaj skriba): Ramsey CARDWELL, Ramai MARTIN, Irvin Charles TERRELL, Zachary VANDEVENTER
- **B2S** (skriba): David BECK, Joshua HOLZER
- **B2K** (parola kaj skriba): Jayden ENTENMANN, Bianca FLOWERS, Carter (Kartero) WILLIAMS
- **C1K** (parola kaj skriba): Logan HALL, Marcia REGO, Kevin RING, Jonathan THOMAS
- **C2S** (skriba): Bill MAXEY
- **C2K** (parola kaj skriba): Orlando RAOLA

Plena multjara listo de sukcesintoj

<<https://edukado.net/ekzamenoj/kandidatoj>>
troviĝas ĉe Edukado.net.

Prepariĝo por KER-ekzamenoj estas utila sperto por lernantoj je ajna lingva nivelo. Perfektigu viajn lingvajn konojn, plibonigu vian parolkapablon, kaj profitu de ĉi tiuj ekzamenoj.

Plenaj informoj pri la KER-ekzamenoj haveblas ĉe Edukado.net <<https://edukado.net>>

/ekzamenoj/ker>.

— Margo COHEN, Direktoro

LK-2023 serĉas programerojn

Charlotte estas Sekretario de E-USA. Oni povas kontakti ŝin ĉe liquidfireangel@gmail.com.

La Landa Kongresa Komitato malfermas peton por programeroj por la venonta LK ĉe Raleigh, kiu okazos tuj post NASK. La temo estos "Komunumo sen limoj". Programeroj povas, sed ne devas, rilati al la temo.



Iu ajn, kiu partoprenos la kongreson rajtas proponi sin por gvidi sesion, aŭ eĉ simple volontuli pri alia helpado dum la kongreso. Ni invitas ne nur prelegojn, sed ankaŭ atelierojn, artaĵojn, teatraĵojn, muzikadon, diskutrondojn, ktp. Diru al ni pri viaj ideoj per la jena **Google-formularo** <<https://forms.gle/MdYqE38TPkAd42sU8>>.

— Charlotte BURTON, Sekretario

Dues, translation, and publishing

Hoss estas Redaktoro por E-USA kaj unu el ĝiaj Direktoroj. Kontakti lin ĉe hoss@lodestone.org.

Free membership for prisoners?

Among the resolutions to come out of the 2022 Congress was a desire for the board to "elaboru senpagan kotiznivelon por esperantistoj en prizonoj."



Typically we receive very few requests from prisoners for free membership, so in the short-term—that is, until next summer's Congress—we'll try to comply

with the resolution by subsidizing up to ten prisoner memberships at the “Limited Income” rate (\$20 each) using money from the General Fund.

Unfortunately, only a small fraction of the membership took part in deciding this resolution. What’s more, some Congress attendees reported being unaware that the resolution was even considered, much less passed.

The Board believes that dues changes are something all members have a right to be informed of in advance – and more importantly, to have a say in. So in 2023 we’ll be putting the question to you, in the form of a ballot initiative for you to approve or reject. The initiative could be something as simple as:

A. Esperanto-USA will provide free memberships to any incarcerated persons in the United States who request one.

But before finalizing the wording, we’d like to get a better idea of how you feel about the idea. Free memberships do have a cost to the organization. Prisoners often have no Internet access, so copies of the newsletter, membership lists, and other items have to be printed and sent to them by mail, at a cost of roughly \$20 per member per year. That cost will have to be borne by paying members, and we’re concerned that some might not be happy doing so, especially if the new membership category proves popular.

So if there isn’t broad support for option A, we might propose to leave the existing dues structure as-is, instead supporting free memberships with a fund built on donations. That proposal could be something like this:

B. Esperanto-USA will create a “Prisoner Membership Fund” to support free memberships for incarcerated persons in the United States. The Fund will be paid for by donations, and will subsidize yearly memberships at the Limited Income rate. Requests must be resubmitted each year, and will be served in the order in which they are received, as long as the Fund has a positive balance.

If you feel strongly about either of these potential initiatives – either for or against – please let us know.

We also welcome further alternatives and potential modifications to the ones above. For example, option A might have a cap, limiting free memberships at some maximum. Or option B could be partially supported by the greater membership through an automatic donation each year from the General Fund.

Traduku!

Jen alvoko por ĉiuj ŝatantoj de la rubriko *Traduku!* Danke al la kompleza permeso de la NASK-estroj, mi organizas printempan NASK-kurson pri tradukarto. Malkiel la kutima hasto de la ĉeestaj NASK-kursoj, kiuj daŭras nur kelkajn tagojn, tiu ĉi estos 12-semajna, reta studrondo, kie oni havos tempon trankvile mediti pri la lernitaĵoj. Ĝi daŭros de la mezo de Marto ĝis la komenco de Junio. Dume ni traktos multajn el la samaj specoj de demandoj, kiuj regule alfrontas la partoprenantojn de la *Traduku!*-defioj – sed pli profunde. Legu pli ĉe la **kursopaĝo en la NASK-retejo** <<http://nask.esperanto-usa.org/sesioj/2023-tradukokurso/>>!

Peter Jameson ankoraŭ haveblas rabatpreze

En la pasinta numero ni anoncis projekton sendi ekzemplerojn de *Peter Jameson’s Secret Language* rabatpreze al aktivuloj por uzo en informado – ekzemple, por lasi en la biblioteketoj *Little Free Libraries*, por donaci al gastoj ĉe klubkunvenoj, ks. En Decembro ni dissendis al aktivuloj pli ol cent ekzemplerojn, kaj ankoraŭ restas mono en la projekto por dissendi pli. Do se vi volas mendi pli ol 20 ekzemplerojn samtempe, ni sendos ilin al vi je kosto de **nur po unu dolaro**. Kontraŭ \$40, ekzemple, vi ricevos 40 librojn – sen ajna imposto aŭ sendokosto!

Por utiligi la librojn en via informado, bv. kontakti nin (ĉu Esperante, ĉu angle) ĉe publishing@esperanto-usa.org. Kaj se vi simple volas aĉeti ekzempleron por vi mem, **la papera bita** <<https://bit.ly/3kiaRZ8>> kostas nur \$4.50, kaj **la bita** <<https://bit.ly/3Tg5khf>> estas senpaga ĉe nia retbutiko.

Ek al Baghy

Poste en la eldon-vico ĉe projekto *Fenikso* estas la klasikaj siberiaj romanoj de Julio BAGHY, kiuj estas jam delonge enskanitaj, plurfoje provlegitaj, kaj nun

bezonas finan kontroladon kaj kompostadon. La unua el la du, *Viktimoj*, estas preskaŭ preta, kaj mi esperas anonci ĝian reaperon en nova vesto antaŭ la somero.

— Hoss FIROOZNIA, Direktoro

Board Meeting, November 26th, 2022

Ĉeestas: Filipino DORCAS, Alekso MILLER, Charlotte BURTON, Fred MEYER III, Hoss FIROOZNIA, Margo KEVESS-COHEN, Timoteo RICE

Ĉeestas sen Voĉdonrajtoj: Vilĉjo HARRIS

La prezidento deklaras kvorumon.

Kutimaj Raportoj

CO

La prezoj estis sendataj al la gajnintoj de la filmfestivalo. Nenio nekutima por raportoj.

Prezidento

Laŭ estrara decido de la antaŭa kunsido, Filipino laboras pri la komitatoj, por klarigi kiujn komitatojn ni havas, kaj kiu estras ĉiun komitaton. He also included funds on the committee list, as some funds are run by committees (such as the Schulze fund). While some funds are managed by individuals rather than committees, listing funds would be beneficial for the sake of having information in one place. The document as it stands includes the name of each committee and fund, the name of the person who chairs it, and contact information for that person, generally in the form of an email address. The document is thorough but incomplete. For example, the publicity committee will be in charge of the Publicity Fund, but as it is a restricted fund, the board must appoint an administrator of that fund and not spend from it directly. During this discussion, the board collectively updates the current list of funds and managers on the website. The president would like a strong publicity committee and asks for board feedback on what publicity looks like: should it publicize E-USA, Esperanto in general, printed materials, social media campaigns, etc? Publicity is a broad concept, including all of these things. Phil suggests we should find one person who would chair the committee and coordinate with various sub-committees whenever a request for publication comes in. This discussion will be continued on Slack.

Old Business

Social Media

Hoss currently posts any new articles across all social media platforms, which is a relatively quick and easy thing

that can be done by a social media manager to keep E-USA on people's feed.

KER

No Americans signed up for the C2 exam this year. Part of this may be due to the times it was offered, but we may also want to offer some motivation for people to pass the exam. British Esperanto Association reimburses, at least partially, the exam costs for those who succeed. We could also work on publicizing what the C2 exam means and why we would want to pursue that if we've already passed the C1 level.

Communication

Discussion of whether the board should influence member activity more or should be influenced by member activity more. The answer seems to be both, as evidenced by the fact that at the recent work sessions, many of the tasks that members requested us to work on are things we have already done or have funds and committees for. This suggests we need to reinforce what we have already done.

Actual Old Business

We have 16 action items on the board agenda which have not yet been addressed and which the board will discuss for at least an hour asynchronous on Slack today.

Board Meeting, December 10th, 2022

Ĉeestas: Filipino DORCAS, Alekso MILLER, David BECK, Jane SHEVTSOV, Fred MEYER III, Margo KEVESS-COHEN, Hoss FIROOZNIA

Ĉeestas sen Voĉdonrajtoj: Vilĉjo HARRIS

A quorum is declared. The revised agenda places two items under old topics: About Tim B discussing information packets, and the board reviewing a list of substantial donors. New topics will include committee names and members, memberships for prisoners, volunteers such as Quintyn, and campaigns for members and/or end of year donations. The agenda is accepted. The secretary, absent from this meeting, is to take notes after the meeting, based on a recording of the meeting, to be followed by the regular procedure for approval of minutes. No objections are registered.

Standing Reports

Central Office

Reminders for annual renewals have been sent out, including paper aliĝilojn for people who cannot access the retbutiko, and the membership list is being put together. It is expected to be sent out by the end of the next week.

Treasurer

The treasurer report has been sent out to the board in advance of the meeting. Per a request in Slack, the financial report shows that we are significantly short (a little over \$14000) of expected donations, but the board is assured that donations do come in heavy by the end of the year. Nothing unusual to report.

President

The president reports that he is able to give more attention to our tasks than he has recently, having made alterations to his work schedule. By the end of the year, he would like to participate in end-of-year campaigns for membership and donations, which should be a multi-venue process, using email, videos, and social media with a consistent message. This will be discussed later, under New Business. Membership will also be addressed in Old Business, with the item regarding Tim B., who is absent from this meeting. Phil also asks whether two recent large donations made it to our financial report. Bill confirms that yes, this is reflected in the current report.

Old Business

Informational Packets and Membership Committee

Tim B is absent, and Fred missed the last membership committee meeting. Margo is unaware of it but had been looking into updating that. *Margo will be in contact with Tim B in reviewing the informational packet for members.*

Substantial Donors

Phil affirms that we should thank substantial donors, naming a few that he is aware of. One member has been sending thank you cards, but they are not necessarily timely. She makes them manually and sends them when she is able. The system sends this member a list of who gave what to which funds automatically for this purpose. Hoss says he and other board members could send this out, provided that we are informed of larger donations and who sent them in. *Bill will have the system send a weekly summary email to the board informing them of any donations.* If anyone gives more than \$500, they get a letter from the CO stating to save this for the IRS. A concern is raised for duplication of effort. Jane suggests this question of reduplication of effort could be handled via Trello, to coordinate who is doing which tasks. It is suggested to ask [member] if she is still doing this, and whether she is okay with us also sending out thank you cards for others. *Phil will contact [member] to verify whether she is still doing thank you cards, whether she wants to continue, and how she would feel if we also send thank you cards to some members. Jane offers to send an email thank you on behalf of the board to a particular major donor.* Bill confirms that the board does still want the information about donations, which they verify that yes, they do.

New Business

Committee List

The list of committees, email addresses, and email mailing lists for the committees, has all been updated and posted online under the contact page. This allows committees to communicate more easily and allows members to easily contact committees. This information will also be included in the paper member list. The chair of each committee has been listed as a moderator of their relevant committee list. This will allow for continuity of communication even as committee chairs change over time.

Memberships for Prisoners

Brandon has been in contact with the board. Discussions on Slack have been ongoing regarding how to best act upon a vote at the most recent LK, wherein members present voted orally that the board should create free memberships for prisoners. This was enacted as one of the resolutions voted on at the Congress. Discussion has arisen as to how to do this without board overreach. The bylaws require that the Congress has to approve any changes to membership categories, but there remains some question as to whether the auditory vote on this is sufficient. The current suggestion by some board members is to have the board set aside a specific amount into a new Prisoner Support Fund, which would allow us to cover membership dues for prisoners in the short term, with the possibility of creating a ballot item in support of a new membership category to offer free membership to prisoners. Limited income membership is \$20, which means that this is unlikely to cost the organization more than \$100. Another suggestion has been to offer a limited time waiver for free membership. Bill states that some prisoners do send letters requesting any free Esperanto items we can send them. Phil states that we need to create a clear path for supporting such people. Currently, the CO tries to send them as much free information as he is able, occasionally including a copy of Step-By-Step In Esperanto. Many of them are already fluent in Esperanto.

It is clarified that the reason why the vote at Congress may not suffice per the bylaws is that the bylaws state the dues are to be determined by the board and approved by the Congress, which this case is the reverse. It is also clarified that this item was not announced in advance, in order to allow for people who are not present to know what they are missing, which leaves room for confusion by some members. Discussion arises as to whether the resolutions should be distributed in advance of the meeting, or whether members should be informed in advance that voting may occur at the Solena Fermo and encouraged to attend online or in person. *Fred and Phil have previously volunteered to create a document explaining what usually happens at a LK, including sample agendas and the customary order of business. This document will be completed before the January meeting. Hoss will create an official ballot proposal in support of free membership for prisoners, to ensure a long-term solution exists.* Hoss recommends that the board meanwhile vote to set aside one or two hundred dollars to fund waivers to give free membership to prisoners. Brandon has also offered to match that amount. This proposal will be put forth in Slack and reported in the

minutes of the next meeting. David suggests that Slack votes should be open for one week and an email sent out, to allow all board members a chance to vote.

Volunteers, e.g. Quintyn

Alekso sent out an email to Quintyn, who had volunteered to be a social media manager. Discussion has arisen in Slack as to how to run social media. Should social media be primarily a method to send out information via our official organ of the newsletter, to ensure that it is all information actually approved by the organization? Do we have someone available to create quick announcements for the

newsletter? Could that be a job of a social media manager, to create quick anoncoj for the newsletter, with a paragraph and a picture? The answer seems to be that yes, that is something that a social media manager could do, would be to write up announcements for the newsletter, which would then be automatically pushed out to all social media accounts of E-USA. A brief side note is made to clarify a new board procedure to ensure fairness of board voting when done asynchronously. This change will be updated in the board handbook.

The item "Campaigns for members and end of year donations" will be dealt with on Slack.

Paco

senintenco esperantaĵo • Ellen EDDY



Ellen atentigis nin pri la jena marko de ligiloj por hundoj, kiujn ŝi vidis en Indianapolis, Indianio. "Oni povas aĉeti pacajn ĉirkaŭkolojn por hundoj", ŝi skribis. "Domaĝe, ke oni ne povas aĉeti ilin por malpacemaj homoj."

Pri edukado en Esperanto-USA

de la prezidanto • Filipo DORCAS

Laŭ nia statuto en la unua paragrafo:
The Esperanto League for North America, Inc. is constituted as a not-for-profit educational organization, whose primary purpose is to further education in, and dissemination of information about, the international auxiliary language Esperanto within the United States of America.

Pro tio, ke ni estu aktivaj pri edukado, la estraro restarigis pli aktivan komitaton pri edukado en Esperanto-USA. Nia nova Komisiito pri Edukado estas Ruth KEVESS-COHEN. Dankon al ŝi por ŝia jam aktiva laboro en tiu komitato kaj ankaŭ en la estraro!

Se vi volas komunikiĝi kun iu ajn komitato de

Esperanto-USA, vi povas uzi la retadreson de la komitato, kiu troviĝas en nia retejo ĉe: Pri ni » Kontakti nin. Legu la liston sub la titolo *Komitatoj*. Rimarku nepre la komitatojn, kiuj laboras por la Esperanta komunumo en Usono!

Ek kaj antaŭen!



Filipo DORCAS

Filipo estas Prezidanto de Esperanto-USA. Li kaj lia edzino Elizabeto loĝas en Fort Worth, Teksaso.

<filipo@grupoj.org>

Bimonthly expense report

de la centra oficejo • Vilĉjo HARRIS

For brevity, only expenditures of \$10 or greater are listed. Contact the Director of the CO at info@esperanto-usa.org if you have suggestions for making future reports more informative. Please note that expenses from our **Restricted Funds** <https://bit.ly/31zL1LK> are **not** determined by the CO, and all questions regarding these funds should be directed to their respective managers.

DATE	PAYEE	AMOUNT	ACCOUNT	MEMO
2022-10-03	GRUBB & ELLIS MGMT. SERV	238	777 Fund Expenses	Esperanto Office- Desk Space C-D4
2022-10-03	Brown, Barbara	167	Goldman Fund Expenses	reimburse Barbara Brown for financial loss at UK
2022-10-03	Hall, Logan W.	166	Goldman Fund Expenses	reimburse Logan W. Hall for financial loss at UK
2022-10-03	Hynson, Ken	166	Goldman Fund Expenses	reimburse Ken Hynson for financial loss at UK
2022-10-03	Hynson, Zergie	166	Goldman Fund Expenses	reimburse Zergie Hynson for financial loss at UK
2022-10-03	UEA-V	166	Goldman Fund Expenses	reimburse Karina OLIVEIRA for financial loss at UK
2022-10-03	UEA-V	166	Goldman Fund Expenses	reimburse Tatu Lehtilä for financial loss at UK
2022-10-11	ENDICIA	16	Catalog Service Postage	monthly charge
2022-10-11	ENDICIA	102	Bulteno - Print & Post	Ue 2022:4
2022-10-11	RAND PRINTING	258	Membership Maint. Expense	UE 2022:3
2022-10-13	Federal & State Payroll Taxes	186	Payroll Tax Expense	Employer taxes
2022-10-13	Federal & State Payroll Taxes	709	Salaries	Employee taxes
2022-10-13	HARRISWB	1722	Salaries	payroll
2022-10-16	ADP	59	Payroll Fees	fees
2022-10-22	BOA CC 7572	10	Res Publishing Fund Expenses	Ingram Spark - proof of Secret Language
2022-10-22	BOA CC 7572	20	Internet Access	ttt website (VULTR.COM)
2022-10-22	BOA CC 7572	35	Res Publishing Fund Expenses	istockphoto.co
2022-10-22	BOA CC 7572	40	Credit Card Expenses	Payflow
2022-10-22	BOA CC 7572	45	Telephone/Fax	800 number
2022-10-22	BOA CC 7572	49	Res Publishing Fund Expenses	Ingram Spark - publishing Secret Language
2022-10-31	PAYPAL	37	Credit Card Expenses	Fees
2022-11-07	GRUBB & ELLIS MGMT. SERV	238	777 Fund Expenses	Esperanto Office- Desk Space C-D4
2022-11-08	ENDICIA	20	Member Mailing Expenses	postage for membrolisto letters
2022-11-08	ENDICIA	280	Bulteno - Print & Post	Postage - retbutiklo
2022-11-10	FIRST INSURANCE	2088	Liability Insurance	D & O Insurance
2022-11-10	Federal & State Payroll Taxes	186	Payroll Tax Expense	Employer taxes
2022-11-10	Federal & State Payroll Taxes	709	Salaries	Employee taxes
2022-11-10	HARRISWB	1722	Salaries	payroll
2022-11-11	ADP	59	Payroll Fees	fees
2022-11-15	ENDICIA	16	Catalog Service Postage	monthly charge
2022-11-15	Film Festival	100	Goldman Fund Expenses	Aaron Fingtam - 2022 Film Festival4 - 5th place
2022-11-15	Film Festival	100	Goldman Fund Expenses	Julia Price - 2022 Film Festival4 - Audience Award
2022-11-15	Film Festival	100	Goldman Fund Expenses	Mack Morris - 2022 Film Festival4 - 9th place
2022-11-15	Film Festival	600	Goldman Fund Expenses	Emily Pietro - 2022 Film Festival4 - 1st place
2022-11-15	Film Festival	99	Goldman Fund Expenses	Serge Rusaki - 2022 Film Festival 7th - place
2022-11-15	Film Festival	100	Goldman Fund Expenses	Ashley Davidson - 2022 Film Festival4 - 4th place
2022-11-15	Film Festival	100	Goldman Fund Expenses	Charlie H - 2022 Film Festival4 - 10th place
2022-11-15	Film Festival	100	Goldman Fund Expenses	Martin Maly Montroussier - 2022 Film Fest4 - 6th pl.
2022-11-15	Film Festival	100	Goldman Fund Expenses	Myrtis Smith - 2022 Film Festival4 - 8th place
2022-11-15	Film Festival	300	Goldman Fund Expenses	Claire Divoy - 2022 Film Festival4 - 2nd place
2022-11-15	Film Festival	400	Goldman Fund Expenses	Simone Davis - 2022 Film Festival4 - 2nd place
2022-11-16	UEA-V	3000	UEA konto	al ELNA-konto elna-w - 2,863.18 EUR
2022-11-16	Miller, Alex	2000	Goldman Fund Expenses	1910 project
2022-11-22	BOA CC 7572	11	Internet Access	Dreamhost
2022-11-22	BOA CC 7572	20	Internet Access	ttt website (VULTR.COM)
2022-11-22	BOA CC 7572	33	Telephone/Fax	800 number
2022-11-22	BOA CC 7572	40	Credit Card Expenses	Payflow
2022-11-22	BOA CC 7572	46	Res Publishing Fund Expenses	Ingram Spark - publishing Secret Language
2022-11-22	BOA CC 7572	75	Res Publishing Fund Expenses	Ingram Spark - publishing Secret Language
2022-11-30	PAYPAL	53	Credit Card Expenses	Fees

Using “ol” with the accusative

language corner • Lee MILLER

Q: In the sentence “Oni ne povas vidi ion pli malgrandan ol sablero”, why doesn’t “sablero” need the accusative ending -n?

A: It’s about the meaning of the sentence. Think about them this way:

1. Mi manĝas legomojn pli ofte ol [mi manĝas] viandon.
2. Mi vidas ion pli malgrandan ol [estas] sablero.

In sentence #1 you need the accusative on “viandon” because it’s the direct object of an understood “mi manĝas”.

In sentence #2, you don’t use the accusative on “sablero” because it’s not a direct object of anything. You’re not seeing a grain of sand. You’re seeing “ion”, and “pli malgrandan ol sablero” simply describes that

thing. You need the accusative on “malgrandan” because it’s an adjective describing “ion”.

Very often in Esperanto, “unseen” grammar like this example comes into play. One example that everyone knows is the common “Bonan matenon!” Although we don’t think about it, the basis of this greeting is “[Mi deziras al vi] bonan matenon.”



Lee MILLER

Liĉjo is a member of the *Akademio de Esperanto*, an expert Esperanto instructor, and he has administered the *Duolingo Esperanto Learners* Facebook group since its inception in 2015.

<licxjo@gmail.com>

Esperanto sur mondpokala pilko

media hits



La firmao Adidas kaj FIFA (internacia futbala asocio) metis Esperantan tekston sur la oficialaj pilkoj de la Futbala Mondpokalo 2022.

Al Rihla, la oficiala nomo de la pilko, signifas “la vojaĝo”-n en la araba. Ĝi kombinas elementojn de la kulturo de Kataro kun novaj teknikoj kaj nuntempaj valoroj, kiel daŭripoveco kaj internacieco.


Sur la triangulaj pecoj de la pilko aperas mesaĝo en ses lingvoj: la angla, araba, ĉina, franca, hispana, kaj Esperanto. La Esperanta tekstas: “FUTBALO ESTAS – KOLEKTIVA – RESPONDECO – PASIO – RESPEKTO – TEAMLABORO – HONESTECO.”

La inkluzivon de Esperanto sur la pilko iniciatis la direktorino de dezajno de Adidas, Franziska LOFFELMANN, laŭ informo de la revuo *Esperanto*.

Zamenhof kaj Ben-Jehuda

Ĉiu estis la dua egoo de la alia

historie • Joshua HOLZER



Eliezer Ben-Jehuda kaj L.L. Zamenhof

La 15-a de Decembro estas la naskiĝtago de L.L. ZAMENHOF. Inter esperantistoj, la datreveno estas “Zamenhofa Tago”, kaj oni ofte festas per aĉeto de nova Esperanta libro. La historio de tiu tradicio devenas de la 19-a naskiĝtago de Zamenhof, kiam li prezentis la “Lingwe uniwersala” al siaj amikoj. Poste tiu lingvo estis rafinita kaj iĝis Esperanto.

Tuj post la Zamenhofa Tago, la 16-a de Decembro, 2022 estas la 100-a datreveno de la morto de Eliezer BEN-JEHUDA, kies klopodoj helpis “revivigi”

<https://bulteno.esperanto-usa.org/a/2021/02/60-hebrea/> la hebrean lingvon.

Zamenhof kaj Ben-Jehuda estis similaj en multaj manieroj. Foje ŝajnas kvazaŭ ĉiu estis dua egoo de la alia.

Ben-Jehuda naskiĝis en 1858 en Luĵkio (Лужки), kiu tiam estis parto de la Rusa Imperio, kaj hodiaŭ estas en Belorusujo. En 1859, nur kelkdek mejlojn for, Zamenhof naskiĝis en Bjalistoko, kiu tiam ankaŭ estis parto de la Rusa Imperio (kaj hodiaŭ estas parto de Pollando).

Dum sia edukiĝo, kaj Zamenhof kaj Ben-Jehuda studis plurajn lingvojn, inkluzive de la franca, la germana kaj la rusa. Kiel plenkreskuloj, ambaŭ viroj kredis, ke lingvo povas solvi kelkajn sociajn problemojn. Por Zamenhof la solvo estis Esperanto. Por Ben-Jehuda la solvo estis adapti la hebrean por

moderna uzo.

Ambaŭ viroj estis konsideritaj ekscentraj fanatikuloj pro tio, ke ili kuraĝigis homojn paroli lingvon “konstruitan” aŭ “artefaritan”.¹ Spite al la kritiko, ambaŭ viroj praktikis tion, kion ili predikis, per integriĝo de siaj infanoj en siajn lingvoprojektojn.

Ekzemple, Ben-Jehuda postulis, ke ĉiu en sia domo parolu unu lingvon. Sekve lia filo, Itamar Ben-Avi, fariĝis la unua denaska parolanto de tio, kion hodiaŭ oni nomas la “israel-hebrea”.² Inter la tri infanoj de Zamenhof, lia filino Lidja plej interesiĝis pri Esperanto. Ŝi fariĝis instruisto de la lingvo kaj dediĉis sian vivon al ĝia disvastigo.³

Entute, ambaŭ viroj enorme oferis strebante al siaj celoj. Dume helpis ilin sindonemaj edzinoj, kies amo kaj subteno ebligis al ili daŭrigi la laboron malgraŭ multaj obstakloj.

Decembro estas ne nur la monato en kiu Zamenhof naskiĝis kaj Ben-Jehuda mortis, sed ĝi estas ankaŭ la monato de Ĥanuko. Tiu detalo estas grava ĉar ambaŭ viroj estis judoj, kaj ambaŭ sopiris al mondo, kie judoj povos pasigi siajn vivojn en paco kaj digno, libera de persekuto aŭ diskriminacio.

Por Ben-Jehuda tio signifis, ke judoj havu patrujon por si mem kaj lingvon por unuigi sin. Por Zamenhof, la solvo estis mondo ne nur pli justa por judoj, sed pli justa por ĉiuj. Li kredis, ke neŭtrala lingvo por interkultura komunikado povus helpi la homaron atingi tiun celon.

Por mi, la testamentajo de tiuj du duaj egoj enhavas du lecionojn. Unue, homoj el diversaj fonoj povas pace interkomunikiĝi helpe de neŭtralaj, egalaj kondiĉoj. Esperanto pravas tion. Due, lingvo povas kreski de nul denaskaj parolantoj al multaj milionoj tre rapide. Tion pravas la israel-hebrea.

En Decembro, la monato de datrevenoj kaj festotagoj (aŭ eĉ poste), pensu pri grandigo de via scio (kaj via biblioteko) per aĉeto de novaj libroj!

Piednotoj

1. Esperanto estas, kompreneble, planlingvo. Kontraste, multaj rigardas la hebrean kiel “naturan” lingvon. Tamen eĉ naturaj lingvoj povas esti planitaj, kaj inter “naturaj” lingvoj, la hebrea estis influita de multe da planado. Inter lingvistoj, estas polemike nomi la lingvon parolatan en Israelo hodiaŭ “la hebrea.” Tiu nomo (aŭ eĉ “moderna hebrea”) sugestas kontinuecon, kiu ne tute ekzistas. Anstataŭe, iuj lingvistoj argumentas, ke la nomo estu “**israel-hebrea**” <https://www.degruyter.com/document/doi/10.1515/9783110364484/html#contents>” aŭ simple “**israela**” <https://global.oup.com/academic/product/revivalistics-9780199812790?lang=en&cc=us>”. Kvankam la moderna Israelo establiĝis post la morto de Ben-Jehuda, en ĉi

tiu artikolo mi uzas la terminon “israel-hebrea” ĉar el la esprimo oni povas dedukti, ke la lingvo parte devenas de pli malnovaj formoj de la hebrea, tamen ĝi estas ankaŭ io nova.

2. Interese, poste Ben-Avi **fariĝis Esperantisto**

<https://jewishcurrents.org/july-31-hebrew-speaking-child>!

3. Bedaŭrinde, ŝi kaj ŝiaj du gefratoj estis murditaj en la Holokaŭsto.



Joshua HOLZER

Joshua estas asistanta profesoro ĉe Westminster College (en Fultono, Misurio) kie li instruas politikan sciencon.

josh.holzer@westminster-mo.edu

Kolofono

Redaktoro/Editor: HOSS FIROOZNIA

Kontaktu nin: bulteno@esperanto-usa.org, aŭ:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CMC #271205, University of Rochester
500 Joseph C. Wilson Blvd.
Rochester NY 14627-1205
United States of America

Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla lingvo. Artikoloj estu inter proks. 500–1500 vortojn longaj. Prefere sendu materialojn retpoŝte, kune kun via nomo, adreso kaj foto. Kun ĉiuj aliaj fotoj bonvolu sendi informon pri datoj, lokoj, kaj nomoj de la foti(n)toj. Ni resendos poŝte ricevitaĵajn materialojn se vi aldonas mem-adresitan, afrankitan koverton.

La enhavo de *Usona Esperantisto* estas havebla laŭ la permesilo CC BY-SA 3.0 <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/deed eo>. Cetere ni petas, ke oni atendu du monatojn antaŭ ol represi la plej freŝajn artikolojn.

Opinioj esprimataj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre reprezentas vidpunktojn de la redaktoro aŭ de Esperanto-USA.

Kontribuantoj bv. legi la kalendaron de limdatoj kaj redakciajn konvenciojn en nia retpaĝaro.



Usona Esperantisto (“American Esperantist”) is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English; preferred length for an article is between 500–1500 words. Please send materials by email if possible and include your name, address, and a close-up photo. With other photos please include the name of the photographer along with subject(s), location, and date. We will return contributions received by postal mail if you include a self-addressed, stamped envelope.

Usona Esperantisto is made available under the Creative Commons license BY-SA 3.0 <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/>. As a courtesy, we ask that you wait two months before reprinting the latest content.

Opinions expressed in *Usona Esperantisto* are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.

Contributors should consult the deadline calendar and style guide on our website.

Mikronoveloj

Mikronoveloj estas ege koncizaj rakontoj, ofte malpli ol 300 vortojn longaj. Por nia mikronovelo-rubriko ni aldonas kroman defion: rakontoj devas esti precize 100 vortojn longaj – nek pli, nek malpli. Ĉu vi emas verki tiel? Sendu viajn centvortaĵojn al la redakcio (trovu la adreson en la kolofono), kaj eble ili aperos en venonta numero!

Franca cepo-suppo


Mi ne aŭdis alarmon, sed, rigardante supren de mia tagmanĝo, mi vidas tra la kafeja fenestro fulmantajn lumojn kaj kreskantan gapularon. Korpo kuŝas surstrate. Ne klaras al mi ĉu temas pri vivulo aŭ kadavro. Ĉirkaŭe svarmas diversaj sukuristoj, farante farenaĵojn. Du homoj tiras brankardon el ambulanco. Viro promenigante hundon apude ekrigardas la scenon kaj tiras la obstinan beston de ĝia celita arbotrunko: Ne decas urini tiel proksime al tragedio.

Ankaŭ mi estas proksima al la malfeliĉaĵo, sed tamen sufiĉe for: Ne maldecas, ke mi daŭrigas kiel kutime. Denove mi atentis mian manĝon. La Franca cepo-suppo ĉi tie vere estas bongusta.

— Debra HAMEL <hamel.debra@gmail.com>

Lageta minaco

Kiam mi estis infano, mi kaj Panjo loĝis en domaĉo en Misisipio. Nian akvon ni alprenis de apuda lageto ĉiutage. Iun tagon, Panjo sendis min denove al la



lageto por alporti akvon. Mi rekuris hejmen kun malplena sitelo. “Luiso, kie estas la akvo?” Panjo kriis. “Panjo – estas granda aligato en la lageto!” mi respondis anhele. “Nu, Luiso, reiru kaj alportu nian akvon. Ĉu vi ne scias, ke la aligato tiel multe timas vin, kiel vi ĝin?” Sed mi rimarkis difekton en ŝia rezonado. “Panjo ... se la aligato tiel multe timas min, kiel mi ĝin ... tiu akvo ne taŭgas por trinki!”

— Benson SMITH <uosuaq@gmail.com>

Laborvesto

“Ĉu vi ŝatas mian novan kostumon?”

“Nu ... ĝi bone sidas al vi.”

“Sed?”

“Sed ĝenas min, kion vi faras.”

“Mi devas! Vi scias tion. Tiel mi perlaboras la ĉiutagan manĝon.”

“Mi scias. Nur ŝajnas maldece ...”

“Deco estas luksaĵo por la dikaj kaj sataj. Mi malsatas.”

Disputante ili hurlas, sed nekolere. Ofte ili esprimis la samajn opiniojn, sed vere ne ekzistas solvo: Se oni bezonas manĝi, oni faras farenaĵon, ĉu decan aŭ ne.

Ŝi plistreĉas la ŝnurojn, kiuj fiksas la felon ĉirkaŭ lia harplena kolo, kaj li eliras. Li jam povas aŭdi blekadon: La ŝafoj estas proksime, kaj la lupo malsatas.

— Debra HAMEL <hamel.debra@gmail.com>

